

# La plumkrono de Moktezumo


MEKSIKA ESPERANTO-ASOCIO, A.C.

[meksika.esperanto.asocio@gmail.co](mailto:meksika.esperanto.asocio@gmail.co)



## ME-A sin prezentas en Rusio

Meksika Esperanto-Asocio, A.C., sukcese vojaĝis al Rusio kaj sin prezentis antaŭ gravaj ruslandaj organizaĵoj de Esperanto kaj elstaraj esperantistoj. Tiamaniere ME-A ekkontaktis leĝe kaj oficiale, pere de sia reprezentanto-delegito Guillermo Macías, instituciojn kun kiuj intencas konstrui kaj daŭrigi esperantistajn rilatojn kiuj ebligas realiĝon de komunaj celoj. Tre afable kaj samideane ME-A estis akceptita de Moskvo-Esperanta Klubo "Lev Tolstoj", klubo aliĝinta al REU –Rusia Esperantista Unio- antaŭ kies membroj Macías prelegis pri Meksikio; ME-A ankaŭ estis afable ricevita de ĉefestraranoj de Eŭropa Universitato Justo kaj de Moskva Esperanto-Centro. Krome de Moskva regiono kaj de suda Rusio kie ME-A vizitis Krasnodar-an provincon, ME-A esperante gastigis en Sankta Peterburgo. Cetere de esperantistoj, la meksika asocio konstatis koran gastamecon de rusianoj.



Katedralo de Basilio la beato, Ruĝa Placo, Moskvo.  
(Foto: G. Macías)



### La plumkrono de Moktezumo eksciigas vin...

Sekve ke Me-a aperigis kaj disvastigis la unuan numeron de sia gazeto, ni ricevis komentojn kaj opiniojn kaj demandojn pri ĝi. Rilate al tiuj, la gazeta redakcio respondas:

- La plumkrono de Moktezumo-n oni povas senpage akcepti kaj ĝin eblas libere resendigi de ciuj ricevantoj.
- Ĉiuj komentoj, opinioj kaj demandoj estos bonakceptitaj kaj persone respondotaj.
- Ĉiu homo kiu interesiĝu kunlabori, bv sendi siajn tekstojn kaj bildojn, kondiĉe ke ili estu originalaj, propraj aŭ leĝe publikeblaj aŭ reprodukteblaj. La plumkrono sinreservas la rajton decidi publiki materialojn, nek pagas kunlaboraĵojn. Oni ne publikas komercajn reklamojn.
- Ni konscias pri kelkaj eraroj en la unua numero (gramatikaj, tajpaj). Bonvolu indulge akcepti nian rekonon.





# Pri la sekso, amo kaj sublimado

Eseo de Antonina Bokarjova

Antonina Bokarjova (amike, *Tonja*) estas rusia esperantistino, filino de fama esperantisto E.A. Bokarjov. Pere de siaj verkaĵoj *Tonja* honoras la memoron de sia patro kiu estis aŭtoro de Rusa-Esperanta kaj Esperanta-Rusa vortaroj kaj gvidis esperantan movadon en Sovetunio dum la 50-aj – 60-aj jaroj de la 20-a jarcento kaj kiu partoprenis organizadon de renkontiĝoj inter diverslandaj esperantistoj dum VI Internacia Festivalo de junularo en Moskvo kaj kontribuis disvastigi la Sovetian Esperantistan Junularan Movadon.



## El la rememoroj

Kio estas la amo? Tiu demando estas unu el la plej gravaj kaj eternaj por ĉiu homo. Certe, ankaŭ min tiu problemo tre interesis. Kiam mi aĝis ĉirkaŭ 14 jarojn, mi hazarde trovis kaj tralegis libron, kiu multege impresis min, influis dum mia tuta vivo la koncepton de vivo kaj de amo. Tiu libro estis “Maksimoj” de François de La Rochefoucauld. Iomete paradoksaj kaj pesimismaj, ili ŝajnis al mi supraĵo de saĝeco. Inter ties esprimoj pri amo estas, ekzemple: “En amaj aventuroj estas ĉio, krom la amo” kaj “Amo enhavas multajn sentojn, reale neniel rilatantaj al ĝi”. Krome, unu el la plej saĝaj libroj pri amo miaŝajne, tralegita jam en matura aĝo, estas “Danĝeraj ligoj” de Choderlos de Laclos, el kiu mi faris iujn elskribaĵojn, ecx provis ilin esperantigi, al tiuj mi revenos iom poste. Do tio estis mia libra koncepto de amo, vere, tute ne koincidinta kun la reala vivo.

En la reala vivo ĉio estis pli komplika.

Ĉiuj niaj penoj kaj ĝojoj originas el la infaneco. Ial reviviĝo de niaj iamaj emocioj, ligitaj kun nia estinto, feliĉigas nin: iuodoro, percepto, impresoj, delonge forgesita, sed subite aperinta. De tie venas ĉarmo de malnovaj filmoj, malnovaj fotoj, malnovaj manskribaĵoj, kies skribmaniero elvokas tute malsamajn emociojn, ol tajpitaj aŭ presitaj. Ju pli malproksimiĝas de la nuno la eventoj, des pli valoraj kaj emociaj ili iĝas. Eble gravas por la homo percepti sian vivon ne kiel vicon da epizodoj disaj, do ne havantaj iun komunan sencon, sed vidi en sia vivo certan leĝkonformecon, unuecon, do percepti ĝin kiel ĉeneron en la komuna ĉeno kun la prauloj kaj posteuloj. Certe, nur kun aĝo venas tiu percepto, tiel grava por kompreno de senco de sia vivo. Pereiga estas por ĉiu homo fortiĝo de tiu komuna ĉeno, lia izoliteco, perdo de la apogiloj, tradicioj, delonge ekzistantaj.

Oni diras, ke de tio, ĉu infano en frua infaneco estis amata de siaj gepatroj aŭ ne, dependas la tuta posta vivo. Precipe de la patrino, kies ligo kun infano estas la plej decida. Mi ĉiam estis romantika kaj enamiĝema, sed eble pro tio, ke en la infaneco ne estis interkompreno kaj proksimeco kun la patrino, mi neniam estis feliĉa en amo, nur iuj raraj momentoj estis feliĉaj. Eble ekde tiam en mi enradikiĝis profunda sento de mia neplenaloro: ĉar mi ne sentis min amata kaj ŝatata de la patrino, ĉe mi ne formiĝis la sento de mia valoro kaj digno. Kun la patrino estis ligitaj la plej komplikaj miaj sentoj: mi sentis eĉ malamon, eble, pro la ofendiĝo: iutempe mi loĝis kun la onklino, ŝia fratino, do mi sentis min forlasita. Kiam en la familio okazis malfacilaĵoj, mi senhezite subtenis la patron: mi instinkte sentis, ke li estis ofendita en tiu situacio. Kiam la gepatroj divorcis, ne staris eĉ la demando, kun kiu mi loĝos: bonŝance, oni min ne submetis al tre dolora juĝproceso, por min demandi pri tio (tiam mi aĝis ĉirkaŭ 7 jarojn). Tamen neniam mi ĉeestis eĉ etajn konfliktojn, nur instinkte, adorante la patron, estante tre sentema al lia humoro, mi komprenis



tion. Tiu mia ofendiĝo kaj sento de kulpo de la patrino konserviĝis preskaŭ ĝis ŝia morto, malgraŭ, ke ŝi multe klopodis por esti necesa al mia fratino kaj mi kaj reale helpadis al ni ambaux en la plej malfacilaj situacioj, precipe dum gravaj malsanoj. La patro neniam pardonis ŝin, do nur post lia morto ŝi povis malkaŝe nin viziti; poste dum ŝiaj lastaj jaroj mi logxis ĉe ŝi. La patrino diris tiam, ke se ŝi povus antaŭvidi ĉiujn postsekvojn de la divorco, ŝi neniam farus tion. Precipe ŝin turmentis la kulpo antaŭ mi. La patrino rakontis, ke ŝi eĉ sonĝis min plorantan kaj ŝin riproĉantan. Finfine nur dum la lastaj tagoj de ŝia vivo mi povis plene pardoni la patrinon, jam mortantan, senmovan kaj kompatindan.

Malgraŭ mia ofendiĝo en la rememoro konserviĝis feliĉaj momentoj, ligitaj kun la patrino, tamen subkonsciaj, tre konfuzaj kaj malklaraj, ekzemple, lulkanto. Mirinde, tiuj rememoroj iam aperis dum miaj amaj travivaĵoj.

Certe, amo necesas por senti sin feliĉa, sen ĝi la vivo estas enuiga kaj monotona, nur ĝi povas interrompi tiun fluon de tempo per iuj helaj subitaj ekflamoj, iuj fajreroj, lasintaj iam profundajn, fortegajn spurojn, kies rebriloj varmigas nin, eĉ se amo ne estis feliĉa aŭ reciproka.

Mi ne kredas je longdaŭra okazinta amo, ĝi nepre transformiĝas en alian senton, eble bonan kaj varman, sed neniam varmege bruligantan, kiel antaŭe. Neokazinta amo iam povas daŭre ekzisti en la rememoroj kaj fantazioj, ne paliĝintaj pro la tempo. Do tial la plej fortaj miaj amoj estis amoj neokazintaj, amoj – fantazioj, parte elpensitaj. Reale mi komprenas, ke tiuj elpensitaj amoj donadis al mi pli da fortaj emocioj, ol postaj tute realaj rilatoj. Ili anstataŭis la veran amon, kiun eble mi estus povinta doni al reala homo por zorgi pri li, vivi per liaj interesoj, esti feliĉa per tio, kio feliĉigas amatan personon, kio, al mi ŝajnas, estas la plej vera pruvo de la amo. Kial tio ne okazis? Eble mi estas tro egoista, eble mi timis grandan amon, eble mi ne kredis je ĝia ebleco por mi, ĉar mi ne amis min mem, kio estas, verdire, la plej grava kaj nekuracebla mia manko.



“Kiso”  
Alberto Tiskarenjo, Aguascalientes

### Pri enamiĝo

Mi estis enamiĝema. Por enamiĝi la ekstera aspekto ludis nenian rolon. Por mi gravas tute alia: la maniero paroli, ridi, moviĝi, la voĉo mem, la konduto, iuj gestoj, sed aparte – la rigardo, ĝia esprimo. Mi tre ŝatas penetran rigardon, en kiu evidentiĝas intereso al alia persono. Tiu rigardo




povas esti tute nelonga, iufoje eĉ fulmrapida, sed ĝi ofte rivelas la veran, aŭtentikan senton, animstaton. Ĝi neniam estas ŝajna, pormontra. Ankoraŭ tio, kio povas fari min enamiĝinta, estas esprimo de mildo, iufoje – kaŝita, interna, ankaŭ ne pormontra.

Sendube, tio estas la plej agrabla, la plej hela, mirinda, cxiopova sento. Ecx se gxi ne estas ankoraux vera amo, sed nur gxia antauxsento, precipe en tiu animstato oni plenigitas de gxoj, de forto. Tio estas interna subkonscia sento, kiam io brubolas interne kaj postulas eliron de energio: kuri ien, oni ne scias kien, sed elspezi gxin. Oni ne povas gxin kontrauxstari, oni kapablas je cxio: nepripensitaj agoj, stultaĵoj. Sxajne, oni elfalas el la reala vivo kaj vivas en alia dimenso, alia mondo, tiu sento similas al ebriiĝo. Certe, ĝi estas rekte ligita kun seksaj instinktoj, propraj al cxuij estajxoj, sed ne cxiam gxi manifestiĝas senpere en seksumado, vere, iufoje en situacioj tute malsamaj, precipe kiam la amo ne eblas pro kondiĉoj, de oni ne dependantaj. Tie tre gravas la rolo de "sublimado" (la termino de Freŭdo, eksplikanta multajn seksajn problemojn) - transporto de seksa energio en alian sferon de aktivado, precipe en la kreadon.

Eĉ se tiu mia amo evidentiĝis, kiel la aliaj, ne vera, miaj suferoj estis tute realaj kaj fruktodonaj por mia mensa aktivado: okazinta en tre dolora situacio, laŭ mia sperto mi ekkonis, kio estas tiu "sublimado": neniam poste nek antaŭe mi tiom ĝuis muzikon, tralegis amasojn da libroj kaj revuoj pri psikologio, traskribadis amasojn da folioj, ilin forĵetadis, poste skribadis denove kaj denove forĵetis. Luj nemultaj el tiuj miaj skribaĵoj konserviĝis ĝis nun: tio estas miaj pensoj kaj multaj citaĵoj, elskribitaj el libroj, kiuj aparte plaĉis al mi. Estas interese ilin relegi nun kaj iujn mi provis esperantigi. Inter aliaj estis "Danĝeraj ligoj". Tio estas libro pri amo por ĉiuj epokoj, ĉiam aktuala. La ludo kun amo, flirto, kiuj ŝajnas la plej allogaj, reale evidentiĝas tute ne senkulpaj, iliaj postsekvoj povas esti tute neatenditaj, tre pezaj kaj gravaj. Tiu ludo povas esti danĝera kaj eĉ pereiga por ĉiuj kunludantoj.

Bedaŭrinde, la stadio de leĝereco, de ebrieco dum amkomenco ne daŭras longe kaj plejofte transformiĝas en aliajn, pli seriozajn sentojn, precipe en la senton de morala devo, kaj finiĝas per geedziĝo kun ĉiuj ĝiaj postsekvoj, kiam unu povas ĉantaĝi la alian, malbonuzi sian influon, trudi al la alia sian modelon de konduto, ja en la duopo malofte okazas ekvilibro: plejofte unu estas subigita, dependanta de la alia. Preskaŭ ĉiam tio estas lukto por sia parto de sendependeco por gardi sian individuecon, al kiu konstante minacas ĝia subpremo. Iufoje la rolo de devigato, de viktimo kontentigas iujn personojn, sed iam ili povas indigni, do tiu mallonga ekvilibro rompiĝas. Eĉ se en la duopo estas normale dependi unu de la alia, tio okazas volonte, kiam neniu sentas sin humiligita, do tiu devigo ĉiam ligitas kun deziro zorgi pri la alia.



"Ŝi"  
Alberto Tiskarenjo



## Pri amo kiel ĝenerala, universala, profunda sento de ĉiuj estaĵoj

Certe, oni povas esti feliĉa, ne nepre per la amo al aliseksulo, sed kiam oni sentas sian valoron por iuj aliaj estaĵoj: infanoj aŭ bestoj. Mi estis feliĉa, kiam mia nepo veturadis al mi. Tiam mi reale estis feliĉa per tio, kio lin feliĉigis. Ni vizitadis muzeojn, teatrojn. Mi legis al li librojn, instruis al li legadon, fremdajn lingvojn, travivadis kune kun li ĉiujn liajn agojn kaj interesojn, klopodis bonguste nutri lin, estis feliĉa, kiam li kviete dormis apude kaj bonhumore vekigis. Eĉ se nun neofte ni renkontiĝas, mi certas, ke estas mia merito en liaj interesoj, en lia amikiĝo kun la kuzino, en liaj kapabloj por lingvoj kaj Esperanto.

Nun mi estas feliĉa, kiam ĉarma, karesema rufa katido venas en mian hejmon, komforte sin sentas ĉe ni, ĝoje ronronante. Ĝi esploras ĉiujn etaĝojn de la granda domo, poste ekruĵigante sur mia brusto, feliĉe murmuras, kareseme eltirante la ungetojn. Do tiuj momentoj de tenero kaj feliĉo certe estas ligitaj kun bezono de amo, integra parto de ĉiu estaĵo, kiu tamen ne estas reduktita nur al seksumado. Reale tio estas multege pli komplika kaj profunda sento, kiun la plej kleraj kaj saĝaj pensuloj pripensis kaj ne ĉiam trovis respondon.

“ Interkomunikiĝo inter seksoj estas kerno de preskaŭ ĉiuj pasioj, ĉiam superantaj



“Brakumo”

Alberto Tiskarenjo

argumentojn de intelekto kaj saĝo, movantaj la plej gravajn historiajn procedojn. Ĝi estas ankaŭ fundamento de religio. Ja religia sento proksimas al la ama – tiu ĉioabsorba amo al Dio, kiu donas fortojn neimageblajn, same kiel granda amo al alia estaĵo, plene ekposedanta la homon. Kun sekso estas ligitaj preskaŭ ĉiuj tragedioj en la vivo. Tio estas danĝera subkonscia forto, kiu dormetas interne de la homo kaj povas esti ruiniganta, sed ankaŭ kreanta. Jam Platono enigis terminon “eroto”, kiu signifis ne Dion de la amo, sed energion de seksa inklino, seksa deziro kaj eĉ soifo de povo, strebado disvastigi sian “mion” ĉien. Erotio enigas energion de seksa inklino, seksa deziro en ĉiun kreaĵon: ĉiuj kulturaj kaj religiaj agoj rezultas el tiu potenca forto, tio estas sublimado kiel la plej alta valoro. Erotio estas enamiĝo al vivo, sento de la vivado, soifo de pleneco de la vivo. Erotika sorĉaĵo formas kaoson de subkonsciaj inklinoj. Kosmo de la amo aperas el kaoso de malhelaj erotikaj impetoj. Se tiu

kaoso direktiĝas alten, ĝi iĝas fundamento de ĉiu kreaĵo: ĉefverkoj de belarto kaj la plej kuraĝaj impetoj de homa pensado. Sed se tiu forto ne trovas altan celon, ĝi povas detrui la plej fortan kaj sanan personecon kaj rezulti eĉ frenezecon, senton de absurda kaj elĉerpita vivo.” (Tio estas eltiraĵo el artikolo pri la amo en la ĵurnalo “Rossijskaja gazeta” (“Rusia ĵurnalo”) № 149 (5228), la 8-an de julio 2010, de Maria Gorodova, kies opinionon mi tute subtenas.)

Do oni devas esti tre atenta al tiu danĝera kaj ĉiopova sento, kiel oni estas atenta al fajro, kiu povas varmigi, sed ankaŭ forbruligi.

# Strategia disvastigo de Esperanto



[meksika.esperanto.asocio@gmail.com](mailto:meksika.esperanto.asocio@gmail.com)

Oni alfrontas problemon, inter aliaj, je komenco de la instruado de Esperanto en latinamerikaj landoj, kiu konsistas pri la nesciado de ĝia ekzisto kaj pleje de ties karaktero kaj eblecoj kiel internacia komunikilo kaj kiel interhomara komprenilo.

Kelkaj homoj erare asertas ke Esperanto estas antikva lingvo ne plu uzata; aliaj, ankoraŭ pli erare, pensas ke temas pri stranga religio kaj iuj opinias ke ĝi estas interesa sed utopika neebbla lingvprojekto. Eĉ estas profesiuloj kiuj iam nur iom aŭskultis pri Esperanto ĉe la universitato. Sed, la plimulto tute ne scias nek aŭdis pri ĝi.

Disvastigo de Esperanto bezonas plenumi tri ĉefajn, gravajn paŝojn.

La unua nepre devas esti disvastigo pri la ekzisto de la lingvo. Ekkomenci kurson sen antaŭa disvastigo de la lingvo pere de prelegoj, konferencoj, ĵurnalaj artikoloj kaj novaĵoj aŭ pere de promocio per la radio kaj televido, povus rezulti malsukcese.

La dua paŝo devos esti la instruado de la lingvo mem. Ĉi tiu aspekto temas pri pedagogiaj aferoj. Lernoplanoj, programoj, materialoj kaj kapabloj por instrui bezonas esti taŭgaj por atingi sukcesan, efikan lernadon.

La tria paŝo temas pri ebligi praktikadon de la lingvo pere de babilado, ebligo laŭ diversmaniera agado, sed ke ĝi ebligu paroladon inter komencantoj. Oni devas konstante organizi agrablajn klubkuvenojn, kaj renkontiĝojn; aranĝojn kun interesaj teatraĵoj, literatureventoj, kantado kaj aliaj spektakloj en kiuj la lingvo fluas kaj, kompreneble, kongresojn aŭ kongresetojn en kiuj okazigu seriozan diskutadon pri gravaj temoj kiuj iamaniere rilatas al Esperanto. Tamen, la plej grava praktikado de Esperanto estas inter homoj kiuj ne samlingve paroladas; tiu ĉi kazo montras al komencanto la bezonon kaj eblecojn de la lingvo kaj do, internaciaj kontaktoj estas nepraj. Teknologijaj avantaĝoj ebligas kontaktojn. Eblas alproksimigi Esperanton al la lernanto, ne kiel ekzotika lernado de ia lingvo sed kiel reala, efika kaj mirinda komunikilo. Sukceso de ĉiu e-organizaĵo dependas de la strategia organizado.

# Blankharara Esperanto

6



Guillermo Macías y Díaz Infante  
[lic.guillermo.macias@gmail.com](mailto:lic.guillermo.macias@gmail.com)

Nunaj eblecoj kiuj rilatiĝas al la disvastigo de Esperanto tra la mondo estas tiel gravaj, tiel ampleksaj kaj realigeblaj kiel neniam antaŭe dum la historio de la lingvo.

Lastjaraj teknologiaj avantaĝoj farigis la mondon eĉ pli malgranda. Kontakti kaj konatiĝi kun homoj tra la mondo estas tiel simple kiel ŝaltigi la komputilon kaj tiel "sonorigi antaŭ la pordo" de iu ajn en ajna lando. Tamen, lingvo nediskuteble estas reala baro. Dulingvecon kaj eĉ pli plurlingvecon ne ofte oni trovas inter homoj. Do, oni bezonas detrui tiun baron por realigi eblecojn kiujn teknologiaj avantaĝoj ofertas.

Teknologio subite malfermis neatenditajn pordojn kiuj eblas la homaran komunikadon. Tamen, mankas vasta uzado de ilo pere de kiu komunikado fluu. Urĝas do plenigi tiun lingvan malplenon kiu ekzistas pro manko de tiu vasta uzado. Esperanto estas la plej facila, ebla kaj riĉa ilo por atingi tiujn celojn

Esperanto povas kaj devas plenigi tiun vastan spacon. Kiel? Tra ĝian instruadon kiun oni faru precipe favore de la junularo. Bone estas ke plenaĝaj homoj lernu kaj praktiku Esperanton kaj ke ili kuniĝu ofte kaj en oftaj kongresoj, sed la plej grava celo de Esperanto kaj de ties organizaĵoj devas esti nepre la monda junularo. Bedaŭrinde, Esperanto pli kaj pli blankharariĝas.

Sen ignori ke precipe en Eŭropo okazas esperantajn aranĝojn por gejunuloj kaj eĉ por infanoj, la plej karaktera bildo pri esperantaj renkontiĝoj estas plenaĝuleco. Eblas riski diri ke tiu bildo estas pleje blankharara. Certe ĉiuj ĉi estas entuziasmaj esperantistoj kiuj ĝoje kaj ĝue parolas la lingvon kaj konstruas gravajn animajn rilatojn inter homoj, sed tio ne sufiĉas por disvastigo, kreskado kaj daŭrado de la lingvo. Post la Dua Mondmilito –kaj precipe ĝiaj rezultoj– malfermiĝis vasta spaco sen grava ekspansio de esperantismo... ĝis interreto kunportis kiel torento la menciitajn eblecojn kontakti kaj komuniki, sed semtempe eknudigis la bezonon pri komuna, facila kaj ebla lingvo kiel komunikilo. Se Esperanto ne estas kunportata al la junularo de la mondo, la lingvo pli kaj pli harblankiĝos.

Do, nepre kaj urĝe esperantistaj institucioj kaj organizaĵoj devas fokusi sian agadon precipe al la gejunuloj kaj certe al la infanaro. Junularo devas esti celo de Esperanto por ke Esperanto estu junulara celo!



## La "Studentumo" (*La estudiantina*)



Juan Pablo Macías Montes  
[jp.canariobike@gmail.com](mailto:jp.canariobike@gmail.com)

"Studentumo" (hispane "*Estudiantina*", elprononcata -es-tu-di-an-tina-) estas grupo de junaj studentoj kiuj ludas kaj kantas gajajn kaj romantikajn melodiojn. La "studentumo" sin prezentas diversmaniere; aŭ en scenejo, aŭ laŭ "*pasacalles*" (pa-sa-ka-jes) (esperantigite "trastratpasado", ludanta kaj kantanta piedirado tra la stratoj, sen loka celo), sed eble ties plej tipa agado estas la "*ronda*" (hispane) kiu estas trastrata nokta irado kantante al la hejmo de la dezirata amantino kaj sube de ŝia balkono ludi romantikajn kanzonojn pretendante konkeri ŝian koron.

La "studentumo" ankaŭ estas nomata "*tuna*" (elprononcu -tu-na-, hispane, aŭ esperantigite "tunaño") kaj ties membroj "*tunos*" (-tu-nos-, aŭ esperantigite "tunaŭooj"). Membroj de "studentumo" uzadas, laŭ la galanta grupa celo, tre karakteristikajn vestaĵojn, kiuj konsistas el jako nomita "*jubón*" (elparolata ĥu-bon), kuloto ("*gregüescos*" -gre-gueskos-), ŝtrumpoj ("*calzas*" -kal-sas-), "*monteo*" -mon-teo- kiu estas mantelo, kaj la "*beca*" (be-ka, laŭ esperanta prononco) kiu estas surkora ŝildo de la koncerna universitato. Ĉi tiu lasta ŝildo kaj la "*jubón*" kutime estas samkolorigitaj laŭ koloroj de la universitato al kiu la studento apartenas. La ŝildo aperas laŭ formo je "V", tiu akorde al la antikva maniero skribi la latinan vorton "*vniversitas*" (universitato). Sur la mantelo de "tunaŭoo" pendas, multkoloraj, rubandoj pendigitaj de virinoj "korkonkeritaj" kaŭze de romantikaj kantoj. Ĉiu rubando reprezentas virinon kiun la kantinto, korinkline, konservas en sia animo... kaj sur mantelo de ĉiu studento pendas multajn rubandojn!

Tiaj vestaĵoj de "tunaŭooj" estis ties de mezepokaj studentoj, kiuj ludadis en trinkejoj kaj en gastejoj por pagi manĝaĵojn kaj gastigadon, krom gajni iom pli da mono por pagi siajn skolstudojn.

La ĉefaj musikiloj de "studentumo" estas bandurio, liuto, gitaro, mandolino kaj tamburino. Dancante kaj farante dancakrobaĵojn dum ludado de tamburino, oni montras la gajan karakteron de "studentumo". La kantoj de "studentumo" kutime rakontas travivaĵojn de studentoj, ĉiam kunligante studvivadon kaj amon. "Studentumaj" kantoj ofte priskribas tiujn noktojn kiam la enamiĝinta studento, kune kun la grupo de romantikaj samklasanoj iras kantirante tra la stratoj de malnova urbo ĝis subon de la balkono de la dezirata amantino, kaj sube de la nokta lunlumo, kantante dediĉigas siajn amsentojn al virino. "*Aŭpa Tuna!*" (gaja eksklamacio -a-upa, tu-na- kies signifo, pli mal pli estus "plivigliĝu studentumo!")



Juan Pablo, tunaŭe




# Kelkaĵoj, novaĵetoj, ktp...

8

Ĉu vi parolas Esperanton?

Kial mi ne lernis  
la internacian lingvon?

Mi estas Malintzino, lia fama  
tradukistino... mi eklernis en  
kurso de la meksika asocio!



Renkontiĝo inter Moktezumo kaj Hernano Kortes

**Bonega novaĵo.** - La Nacia Aŭtonoma Universitato de Meksiko (UNAM), pere de la Regiona Centro pri Multfaka Esplorado, centro kiu lokiĝas en la ĉefurba metropolo, komencis revizii la libron "*Esperanto kaj homa komunikado*" de la verkistino *Isabel Nájera Sepúlveda* -grava meksika esperantistino-, libro kiu estas nepra referenco pri la historio de la meksika esperanta movado, tamen ĝi inkludas historiajn eksterlandajn faktojn pri Esperanto. Ĝia nova eldono baldaŭ aperos.

Meksiko-urbo. - Antaŭ nelonge ME-A vojaĝis al la meksika ĉefurbo por atenti intereson de meksik-urbloĝantoj kiuj kontaktis M E-A-n pro intenco lerni Esperanton. La koncernan renkontiĝon -kafumado- la kunvenintoj igis, senvole, en la unua klaseto de Esperanto, per kiu interesuloj komprenis la tutmondan gravecon de la lingvo kaj eklernis ĝian bazajn gramatikajn regulojn. El tiu kafuma kunsido la novaj gelernantoj faris siajn unuajn vortlistojn kaj gramatikajn ekzemplojn ĉiuj sur paperaj kovriloj el la kafeja tablo!



Mi estas haroĉjo!

La Plumkrono de Moktezumo dankas al... - Sekve de la unua numero de la meksika esperantgazeto kiu naskiĝis en Aguascalientes, ni ricevis internacian torenton de agrablaj komentoj kaj opinioj pri la bongusta desegno kaj altkvalita enhavo de nia revuo (ni jam senkulpiĝis pro kelkaj eraroj). Ni multe dankas pro afablaj komentoj de Stano Marček (Slovakio), Joanna Filipowicz-Choroszuca (Bjalistoko, Pollando), Bert Schuman (Kastelo Greziljono, Francio), Boris Kolker (Usono), Svetlana Smetanina (Moskva Esperanto-Centro, Rusio), Eliana Verona (Brazilo), Vladimir Korchagin (Moskvo, Rusio), Renato Corsetti (Italio), Marta Skrivanova (Ĉeĥio), Cindy McKee (Usono), Antonina Bokarjova (Rusio), Ronald Schindler (Germanio), Ingrid Behrens (Germanio), Lenke Szász (Rumanio), Djalma Pessata (Brazilo) kaj el multaj aliaj esperantistoj.

**Verakruco.** - Disvastigante Esperanton ME-A atingis la gajan meksikan marbordurbon *Veracruz* (ve-ra-krus) -unua urbo fondita ĉe la amerika kontinento, kien elŝipiĝis la hispana konkerinto Hernán Cortés (er-nan, kor-tes)-. Baldaŭe -en la "haroĉa" havenurbo- establiĝos klubo de esperantistoj alligota al ME-A. "*Jaroĉos*" (ha-ro-ĉos, haroĉoj) estas popolmaniero nomi la loĝantojn de la ŝtato *Veracruz*.



# Ducentjara meksika sendependeco (1810-2010)

(dua parto)


Pri la epoko nomita "Porfirismo" kaj komenco de la Revolucio

La sendependa movado kontraŭ Hispanio en ĝiaj koloniaj landoj de la amerika kontinento eksplodis la unuan jardekon de la deknaŭa jarcento. En Meksiko, tiam nomita "Nova Hispanio", tio okazis en 1810. Post milito de dek jaroj, insurgenta armeo fine venkis kaj komencis la historio de sendependa Meksiko.

Dum la unua kvindekjara epoko de memstara ekzistado (vid. Me-informo, 1<sup>a</sup>/2010, 3<sup>a</sup> paĝo) la nova respubliko travivis konstantan bataladon inter du politikaj fakoj, la konservativa partio kaj tiu de liberpensuloj aŭ liberala partio. Ĉi tiu epoko karakteriĝis de tiu konstanta lukto inter ĉi tiuj du partioj. Markas la finon de ĉi tiu epoko tri gravaj historiaj okazoj: promulgo de liberala Konstitucio (1857); promulgado de "Leĝoj de Reformo", pere de kiuj civila povo apartigis ŝtatajn kaj religiajn aferojn (1859-1863) kaj la franca interveno per kiu Napoleono la III-a intencis konkeri la landon kaj establi imperion kun habsburga imperiestro, sed estis venkita de meksika armeo en la historia batalado de la urbo *Puebla* (*pu-eb-la*), fino de epoko dum kiu stariĝas la figuro de Prezidento *Benito Juárez* (*be-ni-to, ĥu-ares*), kiu de indiĝena ŝafpaŝtista infano el Oaĥako (*Oaxaca*, *oa-ĥa-ka*) iĝis advokato kaj atingis la Plej Superan Kortumon de Justeco kaj la respublikan prezidantecon.

Poste de la morto de *Juárez* en 1872, kaj de post kelkaj jaroj kaj politikaj okazaĵoj iĝis Prezidento alia oaĥakano, *Porfirio Díaz* (*por-firi-o, días*). Pere de diskutablaj elektadoj, *Porfirio Díaz* restis sur povo dum tridek jaroj, ĝis 1910. Ĉi tiu tridekjara epoko estas konata en meksika historio, kiel "*porfirismo*".

Politike, la unua tasko de "*porfirismo*" estis pacigado de la lando kaj ebligi trankvilecon kaj sekurecon. Baldaŭe la reĝimo iĝis diktatorema. Oni vivis tiam sub la "*pax porfiriana*" –*porfiriana* paco- kaj sub la influo de liberalismo. Tiam en Meksiko oni ne parolis pri politiko sed nur pri industrio kaj ekonomia kreskado; pri progreso. Kvalito de instruado tro altiĝis en urboj, precipe en ŝtataj lernejoj, en kiuj la instruado estis tute apartigita de religia edukado. Positivismo, doktrino de *Aŭgusto Comte*,



Juárez



Porfirio Díaz



disvolviĝis en meksikaj intelektuloj. Literaturo vaste floris. Industrio progresis, speciale la mineja kaj teksa; grandaj kaj gravaj fabrikoj de komercaĵoj establiĝis, kaj inter ili oni starigis industriojn de vitro, biero kaj fero. Tiam ekkomencis la ekspluatado de la vasta meksika riĉeco de petrolo. Fervojoj rimarkeble disvastiĝis, de 600 km en 1877 ĝis pli ol 25,000 en 1910.

Aliflanke, demokratio estis nur ŝajna; Prezidento *Porfirio Díaz* sin reelektigis sepfoje. Laborrajtoj tute ne ekzistis; laborantoj simple ne rajtis grupiĝi nek klopodi por altigi sian salajron. Oni malpermesis strikojn; du gravajn strikojn oni sufokis kruele. Agadon de laborantoj por plibonigi siajn laborkondiĉojn oni konsideris punebla krimo.



Propreco de kampterenoj estis akaparita; malmulto da homoj ilin alproprigis, tiel kaŭzante "*latifundismo*"-on (el la Latina, *latus*: vasta; *fundus*: terpeco), "vastegbienumismon". Kondiĉoj de kamparanoj estis mizeraj; preskaŭ laŭ sklaveco ili laboradis favore de "*haciendas*" –a-si-endas-, vastbienoj-. Ili ne ricevis monsalajron, sed oni pagis al ili per varoj en vendejo de la koncerna "*hacienda*" mem. Por puni kamparanojn kiuj agadis kontraŭorde, kelkaj "*haciendas*" havis sian propran malliberejon. Ŝuldoj de kamplaborantoj antaŭ la propranto de la bieno rezultis nepageblaj pro mizeraj kondiĉoj aŭ cirkonstancoj de kamparanoj; do, ili laboris dumvive sen ebleco pagi kaj tiel, ŝuldojn do, heredis idoj, okazinte ties enkateniĝon je la "*hacienda*".

Tiaj cirkonstancoj –manko de demokratio, malfavoraj kondiĉoj pri laboro kaj mizero de

kamparanoj- okazigis la Meksikan Revolucion. La movadon eksplodigis *Francisco I. Madero* en la jaro 1910 laŭ la devizo "efektiva voĉdono, ne reelektiĝo", sekve de fraŭdo je balotado pri prezidantelektigo. Baldaŭe laborantoj kaj kamparanoj nutrigis la revolucion. *Madero*-n murdis komplotintoj, sed aliaj batalantoj daŭradis la movadon; inter ili staris *Pancho Villa* (pan-ĉo-vi-ja) (kontraŭ socia maljusteco) *Zapata* (sa-pa-ta), (favore al kamparanoj) kaj *Carranza* (ka-rran-sa) (konstitucia leĝpensmaniero). Post sep jaroj de sangema interna milito, revoluciistoj venkis kaj kiel rezulto de nacia kongreso oni promulgis la Konstitucion de 1917, la unu konstitucio en la mondo kiu ekrekonis laborrajtojn. Tiam komencis la moderna epoko de meksika historio, la postrevolucia Meksiko.





Skulpturo de estraj revoluciistoj kiuj realigis la Revolucion Kunvenon de Aguascalientes



# La alia Rusio

Guillermo Macías



Transsiberia trajno

Rusio estas multe pli ol malvarmo, neĝo aŭ vodko. Rusio ne plu estas la malfermita lando kiu apartenis al la jam estingiĝita Sovetunio. Rusio estas tiel interesa kiel vasta, tiel moderna kiel maljuna kaj tiel forta kiel ĉarma.

Dum ses semajnoj mi loĝis en la rusa lando, ne kiel komuna turista. Mi estis inter rusanoj kaj kun rusanoj; do, mi sentis ilian veran vivon, la ĉiutagan vivmanieron. Mi sentis la afablecon de popolo, kies karaktero unuavide ŝajnas malmola, sed tuje oni malkovras ties profundan ĉarmon.

La landon kiujn mi vidis estas tre malsama ol tiu bildo montrita dum jaroj al la eksterlandanoj, montrita ne de rusanoj mem sed de aliaj interesoj kaj propagandistoj. Ĝi estas lando de alta kulturnivelo; mi vidis rimarkeblan civitismen en la rusa popolo. Ankaŭ rimerkeblaj estas la generalaj vivkondiĉoj; estas videble ke ĉiuj rusanoj havas –almenaŭ– ĉiujn minimumajn kondiĉojn por vivi kun dignoplena teniĝo. Ĉiuj loĝejoj havas komfortkondiĉojn. Tra la tuta eŭroparto de Rusio mi tute ne vidis mizeron, kiu fakte, videblas en multaj aliaj landoj. El tiuj homdigna vivstato, vivkondiĉoj atingas tre –kaj eĉ tro– luksajn –ankaŭ ne maloftajn– situaciojn.



Guillermo Macías, Vladimir Samodaj, Natalya Kaznacheeva

Grandaj urboj kiel la impona Moskvo kaj la belega gemo Sankt-Peterburgo kontrastas kun tipaj vilaĝetoj de la ebenaj teritorioj de la eŭropa Rusio, sed tia interurba kontrasto signifas nenion krom amplekson; ĉiuj urboj –grandaj au malgrandaj– ja ofertas al siaj loĝantoj ĉion bezonatan por homindeca vivo... kaj plie. Urbaj servoj estas bonkvalitaj kaj tra la lando oni trovas bonegan reton de ŝoseojn kaj akuratan fervojoservon.


La ŝanĝo de ekonomia sistemo aperas evidente. Komerco pri ĉio kunportas ĉiujn produktaĵojn el la tuta mondo al la rusaj vendejoj; superbazaroj estas ĉie, bankoj ankaŭ troviĝas ie ajn. Kontraste, oni trovas tra la tuta lando malnovajn konstruaĵojn en kiuj iam videble funkciis fabrikoj laŭ la socialisma sistemo; ili estas nun forlasitaj kaj montras reklamojn kiuj anoncas “oni vendas” aŭ “luigebla”; tiu infrastrukturo atendas –produktcele- novajn investojn, kapitalojn. Krom tio, mi perceptis fortan ekonomion kaj laborema popolo kiu serĉas novajn, pliajn eblecojn plibonigi sian staton.



Kun la estraro de Eŭropa Juro Universitato Justo



Veturilaro estas grava ekonomia mezurilo –kaj indikilo-. Observante ĝin, rezultas pleje du aspektoj. Granda parto de ĝi formiĝas de eksterlandaj markoj, ĉiuj modernaj, novaj kaj eĉ luksaj; la alia parto formiĝas de la ĉarma Жигули –jigulio- rusprodukita veturilo, malgranda sed utila kaj komforta.



Rivero Moskvo

Rusio havas gravan agrikulturon. Ekzemple, Krasnodar, suda provinco, lando de kozakoj, montras siajn intense kultivatajn kampojn, verdaj eĉ dum la malvarma vintro! Riveroj kies fontoj troviĝas en arbaraj montaroj fluas kaj vivigas kampojn kaj homojn tra la tuta provinco. Kropotkin estas ĉarma urbeto, meze de tiu kozaka regiono kiu ĉiam fieras pro esti la gvardisto de la rusa sudlimo.

Kulturaspекtoj estas gravaj en la rusa vivo. En ĉiu urbo kaj urbeto certe ĉiam troviĝas grandaj librovendejoj, kun vasta sortimento, ĉar la rusa popolo ŝatas legi. En la Metroo de Moskvo aperas pli ol ofte la bildo de legantaj homoj. Ŝtataj lernejoj sendube estas bone ekipitaj. Tre videble estas la graveco pri la scienca sciado... La angla lingvo ŝajne ne multe interesas la rusanojn, sed homoj certe interesiĝis pri Esperanto, demandante pri tiu stranga lingvo kiun ili unuafoje aŭskultis paroli.



Esperanta moskva klubo Lev Tolstoj

La rusan popolon karakterizas gastameco. Afablege malfermas rusanoj pordon de sia hejmo kaj regas la gastojn per bongustegaj, abundaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Pano, fromaĝo kaj viandaĵoj kiel fiŝaĵoj kaj kokaĵoj, terpomoj kaj brasiko, same kiel aliaj legomoj kaj dolĉaĵoj tute ne mankas ĉe la rusa tablo. Se io iam mankus, ĝi ne estus la varmega teo!



Esperantista vespermanĝo ĉe Vladimir Korĉagin

Rimarkebla pri rusaj virinoj –inter multaj valoroj- estas ilia beleco, kiun elstarigas bongustaj vestaĵoj. Oni ne eraras dirante ke dum vintro la stratoj estas plenplenaj de belegaj peltaj manteloj, surtutoj kaj ĉapoportataj de rusaj virinoj, ĉiuj belulinoj!

Tra la stratoj kaj en ĉiuj publikaj lokoj oni sentas sekurecon. Tio ankaŭ estas parto de la alia Rusio, la landon kiun mi vidis.



## ME-A kunlaboros kun afrika e-grupo de Kongo



Alexandrine

Aguaskalientes, Meksiko; Kinŝasa, Kongo. - Meksika Esperanto-Asocio kaj Esperantista Grupo de Sankta Rita, kies seĝo estas en Kinŝasa, ĉefurbo de la Demokratia Respubliko de Kongo, en Afriko, interkonsentis komenci kunlaboradon por la sukcesa disvastigo de Esperanto en ambaŭ landoj. Tiun grupo gvidas f-ino Alexandrine Omba Tshamena, entuziasma esperantistino kiu instruas la lingvon jam antaŭ du jaroj en klubo starigita de ŝi mem. La grupo estas multkarakterata ĉar partoprenas en ĝi infanoj, gejunuloj kaj plenaĝuloj, funkciante pere de du grupoj, la baza por komencantoj kaj la alia por progresantoj. Pere de ŝia rilato, ambaŭ organizaĵoj, ME-A kaj EGSR, interŝanĝos spertojn, materialojn kaj laŭeble,

dekomence, enfokusigos sian agadon realigi grupajn videobabiladojn inter siaj membroj, por interparoli pri prefiksitaj interesaj temoj, celante komunan praktikadon de la lingvo kaj kompreneble internacian komunikadon.



Lernante Esperanton, la grupo de Sankta Rita, Kongo.

## Aguaskalientes: kio, kia, kiom, kiel, kiam, ktp...

Meksiko havas jam pli ol 112 milionojn de homoj sur teritorio de 2 milionoj de kvadrataj kilometroj. En Aguaskalientes, unu el la plej malgrandaj ŝtatoj kun nur iom pli ol 5 mil kvadrataj kilometroj loĝas 1.2 milionoj (51-49 procenta virina/vira proporcio). Tamen, en la "varmaakva" ŝtato troviĝas la naŭa metropola areo de la lando laŭ nombro de loĝantoj, la samnoma ĉefurba metropolo, kun unu miliono de homoj.

La ŝtato nuntempe estas pleje industria, precipe pro fabriko de teksaĵoj, aŭtomobiloj kaj elektraj aparatoj, iloj kaj aĵoj; tre grava estas la industrio kiu produktas glaciitajn legumojn kaj hortikulturaĵojn. Staras ankaŭ fabrikado de bretaro por superbazara komerco. La varma-akva metropolo estis dum jardekoj la fervojista ĉefurbo de la lando.



Aliflanke, agrikulture, la ŝtato produktas jare pli ol 45,000 tunojn de maizo, naŭ mil de ĉilo, ok mil de tomato kaj du mil de fazeoloj. Aguaskalientes estas la plej grava produktanto de gujavo en la



mondo (dolĉa frukto, la plej riĉa pri vitamino C). Pri viando, la ŝtato produktas pli ol ducent mil tunojn de kokaĵoj, ol dek ok mil de bovaĵoj kaj ol dek mil de porkaĵoj. Grava estas la industrio de laktaĵoj, sekve de produkti pli ol tricent sepdek mil litrojn de lakto. Miela rikolto atingas kvarcent tunojn jare.

Aguascalientes –kiu lokiĝas en la centra parto de Meksiko- estas pleje semidezerta regiono, tamen ĝi enhavas preskaŭ kvincent hektareojn de arbaroj, precipe en montaroj, kies plej alta punkto atingas 3,050 metrojn sur marnivelo; la plej malalta estas je 1,600 metrojn. La averaĝa alteco en la centra vala parto estas 1,900 metrojn.

Po kvar loĝantoj averaĝe, aguascalientesanoj loĝas en preskaŭ tricent mil loĝejoj, el kiuj ĉiuj havas elektron kaj akvoservon; en ĉiuj hejmoj estas televidilo kaj la triono havas hejmkomputilon. Funkcias en la ŝtato preskaŭ du mil baz- kaj mezlernejoj; preskaŭ unu miliono da homoj rajtas ŝtatajn sanservojn. Laboras en la ĉefurbo pli ol cent tridek sep mil profesiuloj.

Krom industrio, en la ŝtato estas grava komerca agado kaj multflanka servofarado, ekonomiaj kampoj tiel kiel turismo, sano, instruado, transportoj, profesiaj servoj kaj konstruadindustrio.

Al Aguascalientes oni povas alveni el la tuta lando tra bonega reto de ŝoseoj, veturilo aŭ pere de altkvalita busa servo kaj kompreneble, tra la internacia flughaveno. Estu bonvenaj!



“Ĝardeno de Sankt- Marko, Aguascalientes”  
Alberto Tiskarenjo / [tiscarti@hotmail.com](mailto:tiscarti@hotmail.com)

## La ĝardeno de Sankt-Marko

14

En la meksika urbo Aguascalientes troviĝas la “Ĝardeno de Sankt-Marko”, parko tiel nomata ekde ĝia konstruigo meze de la XIX-a jarcento. Kvadratforme ĝin ĉirkaŭas kalkoŝtona balaŭstrado kun kvar arkformaj ĉiuf flankaj enirejoj.

Depost la konkero de Meksiko (1521<sup>a</sup> jaro), apud kelkaj novaj urbfondiĝoj ekzistis “*pueblo de indios*” (pue-blo de in-di-os) (vilaĝo de indiĝenoj) por loĝado de autoktonuloj kiuj laboris por la hispaniaj konkerintoj. Aguascalientes estis fondita en loko de fontoj de varma akvo en la jaro 1575 kiel fortikaĵo por protektado de “*conductas*” (kon-duk-tas) (ĉevalĉaroj) kiuj transportis oron kaj arĝenton de la nordo al la ĉefurbo de Novhispanio. La hispaniaj kolonianoj baldaŭ transformigis la fortikaĵon en urbeton, postulinte indiĝenojn por konstruado kaj kompreneble por ekspluatadi la regionon. Do, oni establis en la jaro 1604, tre apude de la naskiĝinta urbeto, la “pueblo de indios de San Marcos” (san mar-kos). Kaŭze de la mallonga distanco inter la urbeto de hispanioj kaj la indiĝena vilaĝo, ambaŭ baldaŭe kuniĝis kaj rezultis pli grandan urbon.

Komence de la XIX-a jarcento establigis en la urbo jaran foiron de komercantoj kiu okazadis, la unuajn jarojn, en centra parto de la urbo, sed pro ekzisto de vasta tereno inter la preĝejo de la tiama indiĝena vilaĝeto de Sankt-Marko kaj la unuaj domoj de la urbo, oni decidis translokigi la okazadon de la foiro al tiu vasta spaco kaj fari ĝin koincidi kun la religiaj festoj honore de Sankta Marko (la 25an de Aprilo). Tiusamcele oni decidis ankaŭ establi antaŭ la tiea katolika preĝejo grandan ĝardenon kaj tiucele oni konstruis ĝian belan balaŭstradon. La “Gardenon de Sankt-Marko” solene estis inaŭgurita dum la Foiro de la jaro 1847. Kompreneble, la foiro ankaŭ nomiĝis “de Sankt-Marko”, kiu ekde tiam okazadas ĉiujare, estigante la printempan feston de Aguascalientes. Nuntempe la evento realiĝas kun la nomo de Internacia Foiro de Sankt-Marko, kiu allogas festi de kvin ĝis sep milionojn de homoj ĉiujfoje.